

# LA PROGRESO

Bohema organo esperantista ☐ Ĉasopis českých esperantistů

Aperas monate. Jara abono K 4.50 (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. —  
Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Podbradova tř. 6. — Konto de la Pošta ŝparkaso  
no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

B. Tittl:

## AL NIA LIBERIĜO.

Venkis la Justeco!

La barbareco kaj perforto, la plej abomena, kies atestanto iam la mondo estis, post pli ol kvarjara mortlaciga defendo de demokrata mondo droniĝas en sango de sennombraj oferoj kaj en larmoj de vidvinoj kaj orfoj, kaj super ilia tombo leviĝas la el multaj vundoj sanganta, sed tamen nevenkita Libereco.

Renversitaj estas la tronoj de la krimaj monarkoj, falis eĉ la trono de Habsburgoj, kiuj per malliberejoj kaj eŝafodoj devigis la membrojn de nia nacio batali kontraŭ tiuj, kiuj estis al ni karaj, kiuj estis niaj amikoj. Nia sopiro, nia forta espero, kiujn ni ne perdis eĉ en la tempo de plej brutala persekuto efektiviĝis: la partio de la justeco kaj rajto venkis kaj ĝia venko alportis liberecon al nia nacio.

Post tri jarcentoj en aŭstria kaptiteco kaj sklaveco forĵetis la bohema nacio la katenojn de malhonoro, en kiujn ĝi estis ĵetita per la malfeliĉa batalo sur Blanka Monto, kaj proklaminte sian memstaron ĝi leviĝis, por fariĝi en rondo de la liberaj nacioj valora helpanto dum rekonstruado de la de brutala potenco liberigita mondo.

Ni estas liberaj, denove liberaj! Tiu ĉi scio plenigas per senmezura ĝojo niajn korojn kaj forŝovas ĉiun turmenton, kiun ni sub la regado de Habsburgoj devis suferi. Kaj en tiu ĉi nia renaskiĝinta libereco ni danke memoras tiujn, kiuj krom por la sia, batalis ankaŭ por nia libereco, kaj helpis al ni krei nian amatan ĉeĥoslovakian respublikon.

Amikoj esperantistoj tie en la okcidento. Vi en Francujo, Anglujo kaj Ameriko, kiuj

B. Tittl:

## K NAŜEMU OSVOBOZENÍ.

Zvítězila spravedlnost!

Barbarství a násilí, to nejnusnější, jakého kdy byl svět svědkem, po více než čtyřleté úmorné obraně demokratického světa utápí se v krvi nesčetných obětí a slzách vdov a sirotek, a nad jejich hrobem povstává z mnoha ran krvácející, přes to však neporažená Svoboda.

Skáceny jsou trůny zločinných monarchů, padl i trůn Habsburgů, kteří žalářem a šibenicemi nutili příslušníky našeho národa bojovati proti těm, kteří byli nám drazí, kteří byli našimi přáteli. Naše tužba, naše pevná naděje, které neztratili jsme ani v dobách nejhrubší persekuce se splnila: Zvítězila strana práva a spravedlnosti a její vítězství přineslo svobodu našemu národu.

Po třech stoletích rakouského zajetí a poroby svrhl český národ okovy hanby, do kterých uvržen byl nešťastnou bitvou na Bílé Hoře a prohlásiv svoji samostatnost, povstal, aby v kruhu svobodných národů stal se platným činitelem při rekonstrukci od brutální moci osvobozeného světa.

Jsmo volni, opět volni! Toto vědomí naplňuje nezměrnou radostí naše srdce a zatláčuje všechno to utrpení, které pod vládou Habsburgů museli jsme snášeti. A v té své znovuzrozené volnosti vzpomínáme vděčně těch, kteří vedle své, také pro naši svobodu bojovali a pomohli tak tvořiti naši milovanou československou republiku.

Přátelé esperantisté tam na západě, ve Francii, Anglii i Americe, kteří budete čí-

legos ĉi tiujn liniojn akceptu salutojn de la esperantistoj bohemiaj. Al Viaj fratoj esprimu nian plej sinceran dankemon por la heroa batalo kontraŭ la ondo de barbarco, kiu minacis dronigi Liberecon, Rajton kaj Justecon.

Ni genufleksas antaŭ Viaj standardoj trasorbitaj per sango de Viaj herooj kaj de niaj fratoj legianoj, kiuj obeinte la voĉon de sia konscienco, iris flanke de Viaj fratoj batali kontraŭ la pratempaj malamikoj de sia nacio. Kaj ni kisas la sekigitan santon de Viaj herooj, kiuj dum la tuta daŭro de la milito estis eĉ nia espero, espero, kiu nin ne trompis. La potenco kaj honoro de Viaj gloraj nacioj estis nia kredo kaj en Vian helpemon ni esperas eĉ plue.

Ni deziras, ke niaj spiritoj renkontiĝu, Via spirito nobla kaj nia spirito danka. kaj en reciproka amo kaj konkordo ili kiel eble plej multe laboru por la Libereco, Egaleco kaj Frateco de la homaro.

sti tyto řádky, přijměte pozdrav esperantistů českých. Vyříd'te svým bratrům náš nejupřímnější vděk za hrdinský boj proti vlně barbarství, která hrozila zaplaviti Volnost, Právo a Spravedlnost.

Klekáme před prapory prosáklými krví hrdinů vašich a našich bratrů legionářů, kteří poslechli hlasu svého svědomí a šli po boku vašich bratrů bojovati proti odvěkým nepřátelům svého národa. A líbáme tu zaschlou krev vašich hrdinů, kteří po celou dobu války byli i naší nadějí, nadějí, která nás nezklamala. Síla a čest vašich slavných národů byla naší důvěrou a ve vaší pomoc doufáme i nadále.

Přejeme si, aby vaše i naše duše se setkaly, vaše duše šlechtné a naše duše vděčné, a ve vzájemné lásce a souladu co nejvíce vykonaly pro Volnost, Rovnost a Bratrství lidstva.

## MARŜKANTO DE BOHEMSLAVAJ LEGIANOJ.

Laŭ bohema originalo tradugis D-ro Stanislav Schulhof.

Tra ruĝa flam' kaj sanga fer'  
en plej decida hor'  
ni ŝvingas torĉon de koler'  
kun pulvo en la kor'?  
Man' nia kiel de la ŝtal',  
kaj venĝ' en nia vid',  
ni batu, pafu, laŭ signal',  
kuraĝe kaj senbrid'!

Silentu, kiu restas sklav',  
kaj putru sen batal',  
sur nia ŝild', per nia glav'  
ekvivas ideal'?

Kaj se sur kamp' nin trovas mort',  
glav', pulvo, aŭ destin',  
ĝi estas la sokola vort'  
kaj ni plenumis ĝin.

Jen la patruj' en malproksim'  
en malhonor' kaj sang'!  
Atendu, kara, jam sen tim'  
sur marŝo la falang'!  
Sur nia vojo ĉiu pec'  
en sang' kaj en ruin',  
sed el ĝi kreskas liberec',  
de subpremado fin'.

Nin ne timigu sang-ofer'  
jen nia cel' kaj fam',  
eĉ se ĝi estus en infer'  
ni ĝin atingos jam.

### B. Němcová:

Homo estas ĉie homo kaj mi estimas homon — la fraton, en ĉiu homo de kiu ajn nacieco, sed mia propra nacio devas esti por mi la plej kara. Tamen, ĉar ne estas eble, ke unu homo agu por la tuta mondo, oni devas ĉiam komenci de sia

proksimulo, de sia familio, de la komunumo, de la tuta landa kaj nur poste oni agas en la tuta mondo; kiu ne amas la sian, tiu ankaŭ ne amas la fremdan, kiu ne estimas sian naciecon, tiu ne scias esti mi la alian.

Trad. »Fraŭlina rondeto« en Praha.

Dro. Hanuš Jelínek:

## SALUTO AL FRANCUJO.

(Boheme publikita en »Nár. Politika«).

En la tagoj, kiam defalas niaj katenoj, en la tagoj, kiam post tri cent jaroj de submetiĝo kaj malhonoro ni levas la frunton kaj kun klara vizaĝo ni rigardas al libera estonteco, en la tagoj, kiam plenumiĝas la plej ardaĵaj deziregoj kaj la malesperaj preĝoj de fidelaj bohemiaj koroj, al vi apartenu la unua nia penso, vi heroa, nobla Francujo, kiu fidela al la tradicioj de sia estinteco, la unua aprobis nian rajton al libereco.

Por via kaj por nia libereco vi sangis. Sur vin ĵetis sin plej unue la barbara malamiko. Kun artifiko kaj ruzeco ĝi atakis vin, perfortigante ĉiujn di — kaj homajn rajtojn. Ĝi fidis la subtilan gallan penson de viaj filoj, kiuj ĉiam metis la ideon super la perforto, ĝi fidis la konfliktojn, kaŭzitaĵajn per pionira kuraĝeco de reformaj ideoj, kiuj en la sangvinaj kapoj de viaj idoj trovadis bonegan fundon, ja eĉ por via malutilo.

Ĝi atakis vin de malantaŭe, ĝi ruinigis viajn fortikaĵojn, ĝi frakasis la urbojn, sanktigitajn dum cenjaroj per kultura kaj artista laboro, ĝi okupis vin per siaj hordoj, ĝi trafosis kaj piedpremis viajn kampojn kaj viajn vinberojn, ĝi profanis la landon de pratempa civilizacio per barbara rajdanta boto, ĝi renversis la katedralojn, kiujn dum longa tempo konstruadis la genio de via popolo kaj kiuj estis la plej bela fiero de homaro.

Fluis riveroj da sango de viaj filoj kaj fluis torente la larmoj el okuloj de viaj filinoj, super la urbo de Lumo, super via koro kaj la cerbo de la tuta kultura mondo flugadis la monstraj aeroŝipoj de la malamiko kaj pezaj projektiloj de ĝiaj kanoj neniigis la vivojn de trankvilaj dormantaj virinoj kaj infanoj.

Kvar jarojn de teruro vi travivadis kaj ni de malproksime, ankoraŭ en la ungegoj de dukapa aglo, kun timo, sed kun fido, sekvis vian gigantan batalon, ĉar ni sciis, ke nur el viaj sangmakulitaj kampoj povas elkreski nia libereco.

Ni sciis, ke per vi staras kaj falas ne sole nia libereco, sed eĉ la libereco de la tuta mondo.

Nia fido nin ne trompis. El via tero elkreskis la defendantoj, antaŭ kies agoj paliĝas la herooj faroj de Grekoj kaj Romanoj. Ja eĉ miloj da filoj de nia lando alrapidis el ĉiuj anguloj de l'mondo sub viajn standardojn, por morti ĉe flanko de viaj filoj, heroe defendante vian kaj nian liberecon.

Meze de amaso da fajro kaj fero, en profundaj kavoj dum teruroj de furioziĝinta infero, ili staris kvazaŭ granitaj muroj kaj heroe estis mortantaj. Ili ne falis vane. Francujo estas, Francujo estos libera, kaj kune kun ĝi estas kaj estos libera eĉ nia lando. Ni ĉiam amis vin per entuziasma amo, pro via nobleco, pro via grandanimeco, pro via klara, brileca prudento, pro via varmega homa koro.

Hodiaŭ, kiam nia frateco, por ĉiam ligita per elverŝita sango, estas kronita de venko, ni sendas al vi saluton, fluanta el koroj, el animoj, el tuta korpo, kaj la tuta popolo per unusola spiro, en senescepta eksplodo de frata amo admirante viajn heroojn, kortuŝita kliniĝas antaŭ via doloro, kune kun vi ĝi ĝojegas pri via kaj nia libereco, kaj la libereco de la tuta mondo, ĉar venis la tago de gloro, pri kiu kantas via nacia himno:

*Le jour de gloire est arrive!*

Dr. Frant. Krejčí:

## RAJTO DE MALGRANDA NACIO JE EKZISTO.

Fino de la verko publikita en j. 1915. en Česká mysl XV.

Etika ideo kiel ĉiu ideo instigas al faro, ekbruligas la volon, pensas por esti realiĝata. La homa volo povas fariĝi grandega potenco, unu de la kosmaj fortegoj, egalvalora faktoro apud ceteraj fortoj regantaj aferojn kosmajn. Unu volado ne signifas multon, sed kiam kuniĝas voladoj por komuna celo de multego da homoj kaj kiam ĉia fizika energio de miloj ekfluas en unu gravega fluo — kiela efiko, kiela spektaklo! Kaj tiu potenco, kiun la volo de la multaj reprezentas, estas enhavita latente en ideo, kiu povas subigi al si pensojn de la multaj. Ĉiu kapo, en kiun penetris la unu kaj la sama ideo, multigas ĝian latentan fortecon; ju pli multaj homoj akceptas ian ideon, des pli granda estas ĝia forteco pelanta ĝian efektivigon. Sed kompreneble ili devas voli laŭ vero. Kompreneble okazas iam, ke la ideo iĝas faro ĉe unu homo kaj tiras la ceterajn al la antaŭtempa eksplodo, kiu malsukcesas pro kontraŭigo de la potenculoj. Sed kiam volas laŭ vero ĉiuj, aŭ almenaŭ grava plimulto, la ideo maturiĝas por realigo tiel, ke sufiĉas diri: ni volas; kaj ĝi efektiviĝas en maniero kvietaj sen perforto kaj katastrofoj.

Etikaj ideoj estas de tiu speco, ke ilian efektivigon volas ĉiam pli multaj homoj.

ĉar en etikaj ideoj estas donitaj kondiĉoj de io, kion pro natura neceso celas ĉiu homo. Ĉiu homo volas vivi bonfarte t. e. tiel, ke ĝi havu kiom eble plej malmultajn malagrablojn kaj povu sian individuecon sen malhelpoj valorigi. Kontraŭ ĝia tendenco starigas barojn aŭ la naturo en ĝia propra korpo kaj ĉirkaŭaĵo, en kiu ĝi devas vivi, aŭ aliaj homoj celantaj la samon per egalaj rimedoj. La homo ekkonas, ke ĝi devas adapti sin al la naturo kaj socia ĉirkaŭaĵo, ke ĝi efektivigu sian penon vivi bonfarte. Ĝi konsciigas kondiĉojn de la vivo bonfarta kaj en tio estas bazo de moraleco.

Kondiĉoj de la vivo bonfarta povas esti kaj estas komprenataj diversmaniere, moralaj devizoj el tio rezultantaj povas esti do ankaŭ diversaj. Sed estas certe, ke sole tiaj devizoj povas atendi komunan konsenton, en kiuj estas donataj kondiĉoj por bonfarta vivo de homoj ĉiuj, sen diferencoj iaj ajn: seksaj, klasaj, naciaj, rasaj. Al tiaj oni jam venis; nome estas tio devizoj elirantaj el la principo humaneca, kiu supreniĝas super ĉiuj diferencoj kaj donas al ĉiu rajton je egalaj kondiĉoj, donas egalan rajton, egalajn devojn.

Tial ni povas dedukti, ke principo de humaneco estas honorita de ĉiuj kaj poste efektivigita en tuta homaro. Ĉis nun ĝi estas nek honorata, nek efektivigita; sed ni vidas en socia evoluo, ke ĝia efektivigo paŝo post paŝo trudiĝas. Ni vidas kreskon de ĝia forto, ni vidas efikojn de ĝia agado — ni vidas kiel ĝi forigas unu post la alia barojn, kiuj dividas la homojn kaj kontraŭigas ilin malamike — do espero estas rajtigita, ke ĝi detruos la barojn ĉiujn kaj ke la venko suer egoismo estos kompeta, ke ĝi malliberigos homaron de malagrabloj kaj penoj, kiujn ĝi faras el si mem. Jam multo, kio kontraŭestis la plej altajn moralajn principojn, estas forigita, ĉar oni fine ekkonis, ke tio malhelpis tendencon je bonfarto de ĉiuj, kaj tiel estos forigita eĉ la nacieca batalo kaj la malgrandaj nacioj ricevos sian rajton.

Tradukis dr. Stan. Kamaryt.

Karel Havlíček:

Biblioteko estas ankaŭ lernejo, lernejo por la junularo tiel same kiel por naturaj homoj, en kiu instruas multe da saĝaj instruistoj.

Trad. »Fraŭlina rondeto« en Praha.

Ant. Janalíková:

## MIA MALLIBERIGO

en la jaro 1915.

(Daŭrigo.)

Je unua vido ĉiu povis ekkoni, ke virino B. ne estas ĉi tie pro militaj aferoj. Ŝiaj nigraj okuloj estis arogantaj, en la aresto ŝi sentis sin kiel hejme. Ŝi rakontis, ke ŝi venis gastejon, kie ŝi estis gastigita de iu sinjoro, kiu akompanis ŝin poste hejmen kaj donacis al ŝi multe da mono; kiam ŝi rifuzis al li aliron al sia hejmo, li ekkoleris kaj anoncis ke ŝi ŝtelis monon al li. Ŝi alporis por si de procesa debato 6 monatojn.

Similan karakterizon havis iom pli maljuna S., la sama, kiu tuj komence in vitis min per nomo: Kriminalistino! Ĉiam ŝi restis en la ĉelo, dum aliaj promenis. Kaj tre ofte estis perdita peceto da pano, viano k. t. p., kio restis en la ŝranketoj. Sed tre bone ŝi sciis profetlegi la kartojn, kvankam tio estis severe malpermesita. Ŝia kunulino B. mem desegnis kartojn kaj S. profetlegis — sed nur al tiuj, kiuj diversmaniere povis rekompenci ŝin.

Mian kompaton ekvekgis juna virino C., kies edzo estis sur batalkampoj. Ses monatojn ŝi estis graveda kaj ŝia vizaĝo havis la koloron de flaveta vakso. Ŝia luantino denunciis ŝin pro iu eldiro pri germana imperiestro, kiam ŝi postulis sian luprezon. Ŝi konvulsie ploregis ricevinte de sia edzo poŝtkartojn kun demando, kial ŝi nerespondas liajn leterojn. Ŝia subtenpago estis haltigita, ŝia knabeto hejme havis nenion por manĝi. Fine post kelkaj semajnoj estis ŝia afero feliĉe decidita.

39 jara ciganino M. estis dum 7 semajnoj en esplorado, ĉar pasintan jaron en la vilaĝo, kie ŝi loĝis, perdiĝis 2 anseroj. Ŝia edzo ofte sendis al ŝi vidaĵkartojn kaj leterojn plenajn de amo kaj sopiro kaj ŝi tremis pro timo, ke li estos regrutigita. Post mallonga tempo oni alkondukis ankaŭ lin en malliberejon en la sama »an sera« afero. Kio okazos kun ilia Johanĉjo? Ŝiaj nigraj okuluj ĉiam pleniĝis kun larmoj, kiam ŝi parolis pri li. Oni ne povas priskribi ŝian ĝojon, kiam ili estis liberlasitaj. Nun ili iros kune kun edzo gastejon, eltrinkos glason da teo — kaj poste direkte al ilia Johanĉjo!

Krom tio ni havis en la ĉelo 47 ankoraŭ alian ciganinon. Ŝi havis jam 65 jarojn kaj estis vera tipo de balkanaj sudslavaj migrantoj. Ŝi profetdiris al ĉiuj el manplato la estontan sorton kaj per virtuozaĵoj ŝi dancis ĉardaŝon (ilian nacian danceton).

Kaj de nove alia personeto flugaperas en la kaleidoskopo de miaj rememoroj. Tio estas malgranda, velkiĝinta mastrineto Z. kun ruĝeta nazo kaj unusolo dento, kiu estis enigita en ŝia buŝo. — Ŝi laboris kun aliaj laboristinoj sur kampo, kiam preterpasis la vagonaro kun la vunditoj. Ili bedaŭris la soldatojn, komencis paroli pri politika situacio, enmiksitis en la afero ankaŭ la mortintan papon, kaj trovis, ke li estas la vero kaŭzo de la milito. Kaj la mastrineto Z. aldonis al lia nomo iun malbelan rimarkon. Kaj nun la maljuna mizerulino, malfortigita per 11 akuŝoj ne povas vivi en ĉi tiuj cirkonstancoj. Ĉiutage ŝi iras al kuracisto, ĉiutage ŝi ricevas iom da medikamento kaj multe da insultoj. Unufoje vespere ŝi svenis kaj la ceteraj sonoris por helpo. Venis la kuracista servisto, kriante al ŝi tiom da malbelaj vortoj, ke ŝi tuj vekiĝis el sveno. Li promesis al ŝi pli severan punon, se ŝi ankoraŭ unufoje kuraĝos lin vespere voki. Kaj ŝi vane provas almenaŭ dormi dum la nokto, sed eĉ kuŝi ŝi ne povas. Kun blanka tuko sur la kapo, kun jupo ligita ĉirkaŭ la kolo, kun ŝtrumpoj sur la piedoj — kiel fantomo ŝi promenas tra la ĉambro dum la tuta nokto. Ĉe procesa debato ŝia atestantino enmiksitis ankoraŭ duonon da vilaĝo en ŝian aferon kaj la proceso tiel plilongigis. En malespero ŝi metis la ŝnureton ĉirkaŭ sian kolon kaj kuntiris ĝin. Kun larĝe malfermitaj okuloj, kun elŝovita lango ŝi ellasas el sia buŝo neinterligitajn kriegojn. Oni helpis al ŝi kaj sonoris. Sed denove nur riproĉojn ŝi ricevas, pro sia malkonvena konduto kun okuloj fiksitaj je nedifino, kun kapo apogita per ambaŭ manplatoj kuntiriĝinta sidas sur planko edzino de vilaĝestro K., kien alkondukis ŝin ŝia sonĝo — ŝin, kiu estas estimata kaj amata de ĉiuj kaj neniam ŝi iun ofende traktis! Kaj hejme ŝia, edzo kaj ses infanoj vane atendas ŝian alvenon. Oni arestis ŝin en vestaĵo, en kiu ŝi prizorgis brutaron kaj promesis al ŝi, ke la saman tagon ŝi revenos hejmen. Kaj ŝi estas jam du monatojn ĉi tie kaj ĝis nun ŝi ne scias kiamaniere ĉio finiĝos. Kial nur aperis antaŭ ŝi en la sonĝo ŝia filo, kiu estas sur militkampoj kaj de kiu ŝi jam tiel longe nenion ricevis kaj en sama tago venis edzino de arbargardisto kaj K. rakontis al ŝi sian sonĝon kaj ankaŭ la vortojn, kiujn ŝia filo en la sonĝo diris al ŝi, kaj nun estas ne nur ŝi, sed ankaŭ ambau gearbargardistoj en malliberejo. — Poste mi ekscias, ke ili ĉiuj estis kondamnitaj je ses monatoj. La saman punon havis ankaŭ la mastrineto Z.

Helenka K. diferencigis tre de aliaj. Ŝia malgaja sorto estis la verko de sociala mi-

zero. Ŝia propra patrino forpelis ŝin kaj poste la onklino edukis ŝin kiel ŝi povis kaj sciis. De ŝia juneco ŝi ĉirkaŭvagis de unu domo kaj servo al alia. Ĉiam malsana ŝi estis multe foje operaciita, kio kripligis ŝian korpon kaj iradon. Dum tiaj cirkonstancoj estas tre malfacile vivi. Tial ŝi estis ofte devige transportita en sian naskiĝkomunumon. La samo okazis, kiam la milito komencis, kaj ŝi estis denove sen okupo. Ŝi ekkoleriĝis, eldiris malpermesitajn vortojn pri ĉiuj ŝtataj oficistoj kaj pri imperiestrino Maria Terezia kio alportis al ŝi unu jaron da aresto. — Mi vidas ŝin kiel hodiaŭ, ĉiam ruĝan kun korpulenta staturo, kiel ŝi lame iradas tra la ĉambro kaj ordigas objektojn. Ŝi estis tre ordema kaj spite al ŝia sorto ŝi amis humoron. Ŝi estis el Moravio, sed servinte en germanaj familioj en Vieno, ŝi parolis boheme tre malbone kaj ridinde. Tiamaniero parolante ŝi amuzis ĉeestantinojn ofte ĝis noktomezo.

La kvaran tagon de mia restado en Cejl oni alkondukis al ni mastrinon O. Ŝi estis bluokula, freŝa, en la nacionalkostumo de ĉirkaŭaĵo de nia ĉefurbo. Ŝi aĉetis iom da ŝtofo por vesti infanojn. Sed la ŝtofoj estis ŝtelitaj. Oni forprenis ilin de ŝi kaj ŝin arestis. Ŝi estis prudenta kaj kompleza kaj mi havis grandan ĝojon ricevinte pli poste poŝtkarton de ŝi, ke ŝi estis liberlasita.

La saman tagon vespere venis dekokjara Polino B. Ŝi servis en iu Moravia urbo kaj post kelkaj monatoj ŝi elservis al ŝi malgrandan knabeton. El timo kaj teruro ŝi sufokmortigis lin, tuj oni kaptis ŝin kaj post kvar tagoj venigis malliberejon. Ĉiam malsata ŝi manĝis preskaŭ ĉion, kion la ceteraj ne povis manĝi kaj dum kelkaj semajnoj sufiĉe dikiĝis. Ĉar en Cejl povas resti nur tiuj, kiuj ricevas pli ol unu jaron da puno, ŝi estis poste forveturigita Bohemujon, kie ŝi devige laboros dum tri jaroj.

(Daŭrigo).

## Dr. FRANT. KREJČÍ.

Dr. Frant. Krejčí, profesoro de filozofio en la bohema universitato, ĝisvivis en aŭgusto de t. j. sian 60. naskiĝdaton. Ĉe tiu okazo ĉiuj bohemiaj gazetoj resumis en jubileaj artikoloj la sciencan agadon de li, kaj jubilanto ricevis certe multajn gratulojn, kaj mi ne dubas, ke ili estis tre sinceraj. Kaj li tion vere meritas. Dr. Fr. Krejčí estas krom Masaryk la plej influplena filozofo bohema. Li estas predikanto de la kredo je la homa intelekto en scienca vero. En etiko li instruas determiniemon, el kiu scias dedukti la plej altajn moralajn verojn. Liaj ĉefaj verkoj estas: Elementoj de psikologio (verko en 5 volu-

moj), Filozofio de estanteco, Libereco de volo kaj moralo, Filozofio de la lastaj jaroj antaŭ la milito. — Certe oni povas iam dubi pri la absoluta vereco de la fundamentaj veroj de liaj sistemoj, sed neniam oni ne povas ne admiri la logikan konsekvencon de liaj deduktoj kaj ne respekti la absolutan malcedemon, per kiu li valorigas siajn verojn en la praktiko. Neniam li timis batali por ĉio, kion li kredis ĝusta, eĉ se la ideo estis tiam ankoraŭ mokata. Li ne timis, kvankam dum tiamaj cirkonstancoj ĝi estis timinda, havi festan paroladon en la internacia kongreso de Libera Penso en Praha, kaj ankaŭ alimaniere ligi sian nomon kun ĝi. Ankaŭ pri esperanto li ne timis — la sola de la bohemiaj universitataj profesoroj — proklami, ke ĝi estas efektiva multigo de la homara progreso. Pri tio li eĉ verkis atentindan artikolon por Bohema Esperantisto (j. III., p. 156.). Sed ne nur pro tio, sed eĉ pro sia tuta laboro pensa meritas dro. Frant. Krejčí dankemon de esperantistoj.

Dr. Kamaryt.

## SALUTAJ AL NIA LIBERECO!

En la lasta tempo ricevis nia redakcio kelkajn leterojn, per kiuj niaj fremdlingvaj samideanoj esprimas al ni siajn gratulojn okaze de liberiĝo de nia nacio. Jen ni citas du la plej interesajn:

...la dek kronojn mi sendas kiel apogsumon por Viaj celoj. Same, kiel niaj veron skribantaj gazetoj esprimas la volon de la Hungara popolo vivi en paco kaj reciproka kompreniĝo kun la libera Bohemlando, respektante la rajtojn de ĉiu ajn nacio, kaj same, kiel la nova Hungara Nacia Konsilantaro deklaris, ke ĝi aprobas Bohemlandon kiel memstaran ŝtaton kaj volas en paco kaj frateco vivi apud ĝi, ankaŭ mi alportas per mia modesta apogsumo la simpation kaj kunsenton de la hungaraj esperantistoj!

Vivu la memstaraj Bohemlando kaj Hungarlando!

Ĉift. Paŭlo Balkányi, Budapest.

...Nun glorie venkas la noblanima ideo de l' Esperantismo: la lingva egaleco kaj memstare de ĉiuj nacioj, grandaj eĉ malgrandaj.

Vivu, kresku, floru la liberama Bohema nacio! Vivu, kresku, floru la sendependa Bohemslovaka ŝtato!

Kun koregaj salutoj kaj amika manpremo Via sincere sindona

Alfred Schiebenschlein, Wien IX.

Ni ja certe ne bezonas deklari, ke la salutesprimoj de niaj hungaraj kaj germanaj amikoj estas por ni speciale ĝojigaj kaj ni ilin plej varme reciprokas. Sincere ni deziras, ke inter iliaj kaj nia nacioj ekfloru baldaŭ plej kora amikeco por alporti pli feliĉan estontecon al niaj liberigitaj popoloj.

B. T.

## ESPERANTISTOJ ĈE LA MINISTRO POR INSTRUADO.

La 17. de t. m. sendis la esperantaj societoj en Plzeň siajn delegitojn al la nuna ĉeĥoslovaka ministro por instruado kaj kulturo so. Haberman por esprimi al li salutojn kaj ĝojon de la lokaj esperantistoj, ke la grava kaj honora ofico estis destinita por li. La delegitoj: soj. J. Pech, prezid. de la Laborista soc. esp., Fr. Fikrle, vicprezid. de la Esper. Klubo, Fr. Kavan, administristo kaj B. Tittl, redaktoro de La Progreso sciigis son. ministron, ke la bohemiaj esperantistoj prezentos al lia ofico skriban proponon pri enkonduko de Esperanto en lernejojn de nia respubliko kaj petis, ke ĉi tiun proponon li favore prijuĝu. So. ministro, kiu estas persona amiko de multaj esperantistoj en Plzeň kaj eĉ de nia movado (la ĉefartikolo en la 1. kajero de nia gazeto estas skribita de li) proklamis siajn daŭrajn simpatiojn al nia movado kaj promesis, ke al la solvado de la prezentota propono estos invititaj ankaŭ la reprezentantoj de bohema movado esperantista. La esperantistoj en Plzeň petis nian Konstantan komitaton prilabori la menciitan skriban proponon.

	<b>DIVERSAĴOJ.</b>	
---	--------------------	---

En la finiĝanta militepoko revenas multaj niaj amikoj en siajn hejmojn. Prof. Fridrich el Prostějov, prof. Pitlík el Praha, JUDr. Fousek el Beroun kaj ĉefinĝ. Novák el Plzeň nin ĝojigis per siaj sciigoj pri sia reveno kaj ni sincere premas iliajn manojn, bonvenante ilin en nian rondon. Ni esperas, ke ilia reveno helpos al la plivigliĝo de nia movado.

Konkurso. Ekzamena komisiono de Boh. Asocio Esperantista, volante konstati la nombron de bohemiaj samideanoj kapablaj traduki tekstojn nebeletistikajn, aranĝas konkurson de la plej bona traduko de deklarioj de bohemiaj deputitoj en la Viena parlamento el 21. V. 1917. kaj 6. I. 1918. (Enhavitaj en la bohema broŝuro »Tři projevy čes. národa«, Kočí 1918). La tradukoj subskribitaj per devizo, akompanataj per adreso en fermita koverto estas sendotaj ĝis la 31. jan. 1919. al dro Stan. Kamaryt, Vinohrady, Blánická 5. — La tri plej

bonaj tradukintoj ricevos 4 jarkolektojn de Bohema Esperantisto, Jazyk všeslovanský a Esperanto kaj Úvahy o jaz. mezin.

Husova škola (bohema popola universitato) en Praha, enmetis en programon de la 1. semestro 1918—19 kurson »tuthomaraj intereso« en kiu la tri unuaj paroladoj estas pri la lingvo internacia, ilin prezentas dro. Kamaryt. Pluaj temoj de tiu ĉi kurso estas: Internacia organizo de la scienca laboro (dr. Kamaryt), Internaciaj pagoj (Mil. Schmidt), Pacifismo (prof. Foustka), Bibliografio (L. Živný), Skribo (dr. Matiegková), Internacia kartografio de la firmamento, Mezurado de la tero, Decimale sistemo, Termometro, barometro, firometro, kalendaro (prof. Kubelík). Inter la lingvaj kursoj estas ankaŭ esperanta, en kiu instruas Dr. Kamaryt 50 kursanojn.

Holando. La progreso de Esp. en Holando estas bone ilustrata per la apero de du novaj gazetoj: La Estonto, beletria monata gazeto por junuloj, kiu aperas en Haarlem kaj Nederland-Esperanto, monata propaganda gazeto en Haag, kiuj aliĝis al nia malnova propagandisto La Holanda Pioniro. La recenzi pri ili ni alportos en la dec. numero.

Esperanta Finnlando, ofic. organo de Esp. asocio de Finnlando aperas monate kiel aldono al Kodin Lehti. Aparte abonebla ĝi ne estas. Jara abono de K. L. kun Esp. Finl. estas 8 Fmk. Adreso de la redakcio estas: so. Vilho Setälä, Antti Rätty, Leo Jalava.

Simplomoj! La centra organo de GEA. Germana Esperantisto ĝis nun eĉ ne per unu vorto menciis la aperadon de la Progreso, kvankam ĉiuj aliaj eĉ transmarraj gazetoj skribis pri ĝi. La motivoj, pro kiuj tiu gazeto silentas, al ni ne estas konataj, sed ili estu kiu ajn: naciecaj aŭ timo de konkurado, ni notas ilin kiel simptomojn de nebona gazetista kolegeco.

Kiu vendos Vortaron de Kabe, sciigu sian adreson al la redakcio de La Progreso.

## KRONIKO.

Praha. Fraŭlina rondeto en la pasinta jaro kunvenis 43 foje, aranĝis 5 festvesperojn, 2 kursojn (instr. Finoj. Dandová kaj Šupichová), partoprenis en ĉiuj kunvenoj aranĝitaj de Boh. Asocio kaj Unio. Oni tre multe uzadis la bibliotekon kaj legis la abonitajn gazetojn: La Progreso, Germ. Esperantisto, Esperanto kaj Esper. Voĉo. La rondeto estas honorita per la dediĉo de verko »Bohemaj grenatoj« de dr. Schulhof. Multaj gastoj el esp. mondo vizitas la rondeton. La rondeto de nun kunvenas ĉiam lunde, de la 6. — 7. vesp. en Ženský klub (Praha II, Jáma 5).

Al la skriba kurso de Fino. Šupichová en Malý Čtenář aliĝis ĝis 15. oktobro 119 lernantoj.

Plzeň. Lidová škola (popola lernejo de soc. dem. partio) aranĝas inter aliaj lingvaj kursoj ankaŭ la esperantan, en kiu instruas so. J. Pech.

Doudlevce ap. Plzeň. La 28. de nov. komencis en la loka lernejo nia senlaca propagandisto so. Pech instrui esperanton en vespera kurso, kiu daŭros 4 monatojn.

Wien. Unua Viena Esp. Unuiĝo funebras pro la morto de sia sekretario so. Verderber, kiu en juna aĝo mortis je hispana gripo.

So. Steinhäuer gvidas 2 perf. kursojn: unu en Pädagogium, la alian en la ejo de U. V. E. U. So. dir. Schamanek gvidas kurson en la teknika lernejo. So. Stud. Phil kaj Jur. Fr. W. Illing laboras por restarigi la Vianan akademian esp. asocion.

Esp. societo Danubio havis la 24. nov. sian malferman kunsidon. En la provizoran estraron oni elektis: prz. so. Kaftán (I. Schulhof 2. III.) sekret. so. Ant. Čech (IX. D' Orszag. 7. 23), kas. so. H. Strejček, bibl. so. Fr. W. Illing. Aliĝis 16 novaj membroj. Oni petas samideanojn je poŝtkartoj kaj propagandiloj

J. Šupichová:

## ANGULETO POR KOMENCANTOJ.

### 4a fragmento.

El parolado de Dro. L. L. Zamenhof en la Londona Guildhall 1907:

»La dua kulpigo, kiun ni ofte devas aŭdi, estas tio, ke ni esperantistoj estas malbonaj patriotoj. Ĉar tiuj esperantistoj, kiuj traktas la esperantismon kiel ideon, predikas reciprokecon kaj fratecon inter la popoloj kaj ĉar laŭ la opinio de la gentaj ŝovinistoj patriotismo konsistas en malamo kontraŭ ĉio, kio ne estas nia, tial ni laŭ ilia opinio estas malbonaj patriotoj, kaj ili diras, ke la esperantistoj ne amas sian patrujon. Kontraŭ tiu ĉi mensoga, malnobla kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej energie, ni protestas per ĉiuj fibroj de nia koro . . . La esperantismon, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon, meniam povas esti malamikaj inter si . . .«

### Důležitá rčení. Gravaj frazoj.

Kulpigi iun pri io = obviniti nekoho z ně-  
žeho.

Patriotismo estas amo al la patrujo. = Vla-  
stenečtví je láska k otčině.

Trakti kun iu = jednatí s někým.

Konsisti el io = sestávatí z čeho.

Helpi sin reciproke = pomoci si vzájemně.

Protesti kontraŭ io = protestovati proti ně-  
čemu.

Muskolaj fibroj = svalová vlákna.

### Traduko.

La vintro. En la vintro la naturo ripozas kaj la tero akiras novajn fortojn por la prin-  
tempo. La arboj estas senfoliaj, nur la abioj,  
piceoj kaj pinoj retenis por si la verdan  
veston. La kantbirdoj forlasis nin, ĉar mankas  
la nutraĵo al ili. La homoj scias gardi sin  
antaŭ la vintro, sed multaj bestoj fartas mal-  
bone. La glitkurantoj peladas sur la glacio  
kaj la infanoj faras neĝfigurojn. La vintro  
ardigas iliajn vangojn, tamen ili preferas esti  
ekstere ol en la ĉambro.

### Přeložte.

Réva. Zahradník měl u svého domu révu.  
Mívala každého roku chutné brozky. Jeho sou-  
sed mu toho záviděl. Uřízl v noci několik nej-  
delších prutů z révy. Toto zahradníka velmi  
zarmoutilo. Nevědělo se tenkrát ještě, jak při-

rezavání révé prospívá. Réva měla následujícího roku tolik hroznů, jako nikdy před tím.

### Druhý pád.

Vim ze zkušenosti, že začátečníci mnohdy chybují, užívajíce 2. pádu s předložkou »de« tam, kde má býti 4. pád (—n). Proto uvedu níže několik příkladů, které budou ukázkou nesprávného užití 2. pádu.

Známo, že 2. pád tvoříme na otázku  
koho? čeho? či?

Zdálo by se tudíž, že zájmena a podstatná jména v následujících větách mají býti přeložena 2. pádem:

1. Nečiň toho! (čeho?)
2. Oreš much nelapá. (čeho?)
3. Bojím se nemoci. (čeho?)
4. Nechci míti zbytečných starostí (čeho?)
5. Nedovolali jsme té ženy. (koho?)
6. Poslechni mé rady! (čeho?)
7. Užij své práce! (čeho?)
8. Zasloužil si trestu. (čeho?)
9. Chopte se zbraně! (čeho?)
10. Nasyťte svých bratrů! (čeho?)

Avšak v těchto a podobných případech má Esperanto vždy 4. pád (—n) a vazby užitých zde sloves jsou takovéto:

Fari ion, kapti ion, timi iun (ion), havi zorgojn, krialvoki iun, obei konsilon, uzi laboron, meriti punon, ekkapti armilon, satigi fraton (nikoliv: fari de tio, kapti de muŝoj, timi de malsano a p.).

Správný překlad uvedených vět:

1. Ne faru tion! — 2. Aglo ne kaptas muŝojn. — 3. Mi timas la malsanon. — 4. Mi ne volas havi superflujajn zorgojn. — 5. Ni ne krialvokis tiun virinon. — 6. Obeu mian konsilon! — 7. Uzu vian laboron! — 8. Li meritis punon. — 9. Ekkaptu la armilon! — 10. Satigu viajn fratojn!

### LINGVA FAKO.

La redakcio de »Esp. Voĉo« (Kraków, Dietla 62) disputante kun la redakcio de tiu ĉi gazeto skribas:

## Novaj esperantaj signoj

simplaj, sed tre elegantaj, pingle aŭ broĉe aranĝitaj, en kvinangula formo, estas aĉe teblaj ĉe

### BOHEMA ESPERANTO-SERVO

Moravany, Bohemujo.

1 peco 2 K, poŝte K 2,40; 10 pecoj K 18.—  
100 pecoj K 160.— afrank.

»Ni ankaŭ Vin afable (!!) petas klarigi al ni la kialon de du akuzativoj en la Progreso (1—2) »al nin« en la versaĵo de Dro. Schulhof kaj »al celon« en la alia versaĵo.

La redakcio de la Progreso sendis al mi afable la koncernan numeron de Esp. Voĉo kaj jen estas mia respondo:

La redakcio de Esp. Voĉo estas efektive prava riproĉinte al mi la akuzativon post la prepozicio »al« en la sekvantaj versoj:

El tuta mond' teruraj krioj  
alflugas jarojn jam al nin —

sed la eraro ne estas tiel grava, ĉar en Esperanto troviĝas regulo, laŭ kiu, por esprimi direkton, oni aldonas al la vorto finon »n« (Fund. de Esp.).

Malgraŭ ĉi tiu ĝenerala regulo estas la uzado de akuzativo post la prepozicio »al« tamen erara, ĉar de la komenco de Esperanto ekzistas kutimo uzi post la prepozicio »al« ĉiam nur nominativon, ankaŭ tiam, se ni volas montri movon aŭ direkton.

Ĉi tiu kutimo estas unu el malmultaj tute ne rimarkitaj esceptoj en Esperanto, sed la kutimo, kiu fariĝis ĝenerala kaj estas por ni leĝo aŭ regulo, tute same, kiel okazas en lingvoj naturaj. Sekve mi konfesas, ke mi uzis erare akuzativon, kie la kutimo, (sed ne la regulo) deziras nur nominativon. Estas esperantistoj, kiuj demandas, kial en ĉi tiu okazo oni ne uzas akuzativon.

Jen ekzemplo el Esp. Sintakso de P. Fruictier, paĝo 42.: »Rim.: Post »al« kaj »ĝis« Dro Zamenhof kaj plej multo el esperantistoj uzis ĝis nun ĉiam nominativon. Tio ĉi povas ja alporti pli da klaro en la frazon, evitante amasiĝon de akuzativoj. Tamen okazoj estas, kie »al« montras dativon senmovan (La rozo apartenas al Teodoro) kaj aliaj, kie ĝi montras certan almovon (mi iras al la onklo); oni povas demandi, kial en tiu lasta okazo oni ne uzas akuzativon. (Laŭ E. L. Steckel).«

Sekve la uzo de »al nin« ne estas tiel granda peko, kiel unuavide aspektas, sed ĝi estas tamen eraro, kaj mi ĝin, kiam la poemo ostos eldonita en ia kolekto, certe forigos.

Dro. Stan. Schulhof, Pardubice.

## Por nova, ŝakeca ludo

kiu en originala maniero simbole prezentas

## la tutmondan militon, oni serĉas eldonanton.

Sensacia novaĵo por la kristnaska sezono!  
La interesigantoj petu informojn de

**BOHEMA ESPERANTO-SERVO**  
Moravany, Bohemujo.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.